Skizo de nova projekto: interreta monda mapo de kursoj

Propono de Feliks CEŜ, komitatano A por la Germana Esperanto-Junularo, felix@tejo.org

***Resumo**: La ekzistantaj servoj por serĉi fizikajn regulajn aŭ neregulajn kursojn estas nemodernaj. Centra, alloga kaj pova servo povas esti bona oferto de TEJO por la membroorganizoj. Mi proponas, ke en la sekvonta oficperiodo, TEJO kreu tian servon por la landaj sekcio. La projekto estu farata far volontulo sub gvido de la komision pri reta agado aŭ mi*

La Germana Esperanto-Junularo en 2003 enmetis en sian paĝaron mapon, kiu montras Esperantokursojn okazontajn en Germanio (Ilustraĵo 1). La datumoj por tiu mapo estas liverataj de la servilo www.esperantoland.org. La oferto de esperantoland.org estas fakte tutmonda solvo, tamen ĝia uzo estas iom konfuza kaj nevaste uzata ekster Germanio.



Ilustraĵo 1: La kursa mapo de la Germana Esperanto-Junularo (www.esperanto.de/dej/kursoj/listo

Hodiaŭaj mapuzantaj servoj ne uzas tian skizan memfaritan mapon, sed plej ofte profesiajn, senkostajn mapajn servojn. Du projektoj estas ĉi tie menciindaj:

- **GoogleMaps**: Komerca, senkosta oferta de la firmao google
- **OpenStreetMap**: Libera projekto de komunumo

La avantaĝoj de la uzo de tiaj servoj multas. Jen kelkaj:

- Komforta navigado en la mapo
- Skalumebla rigardo
- Detala montrado de la ĉirkaŭaĵo de la kursejo kun haltejoj ktp.
- Ebleco kalkuli vojon de ekirejo al kursejo

- Plenumo de la atendoj de nuntempaj junaj uzantoj de interreto pri maprilataj servoj

En la ĵus finiĝinta renovigo de la paĝaro de Pasporta Servo uzatas la servo GoogleMaps. La rezulto estas moderna aspekto kaj bona uzebleco:

Ilustraĵo 2: Rigardo al la mapo de Pasporta Servo antaŭ skalumado

Ilustraĵo 3: Skalumita, detala rigardo al gastigantoj en norda Germanio

Propono:

Mia propono estas krei similspecan servon kiel tiu de Pasporta Servo montrataj en Ilustraĵo 2 kaj Ilustraĵo 3por kursoj. Tiu servo rajtu esti uzata kaj flegata far ĉiuj Esperantistoj. La mapo estu facile enigebla en ekzistantaj paĝaroj kaj laŭbezone adaptebla.

Se iuj malbontrovas la uzadon de google por tiu servo, eblas kontroli la eblecon uzi OpenStreetMap por tiu ĉi projekto.

Por realigi la projekton mi petas la komisionon pri reta agado trovi taŭgan programiston. Eble oni povas reuzi koderojn de la paĝaro de Pasporta Servo. Mi esperas, ke por la projekto troviĝas volontulo.

Eblus aldoni pluraj utilajn funkciojn al tia mapo:

- Filtri la kursojn laŭ tempo
- Indiki per koloro la tempa distanco al la kurso
- Aboni novaĵojn aŭ rss-on por regionoj
- Esti informota pri novaj kursoj en iu regiono

Gravas tamen unue havi bazan funkciantan version, kiu superas la nun ekzistantan.